



La pruvo de utileco dependos de la kvalito de fakaj terminaroj kaj ilia scienca rekono. La sekvaj necesaj periodoj evoluigos jam aŭtomate: utileco – bezoneco – neevitebleco. Se ni pruvos la utilecon, la mondo mem rekonos bezonecon de uzado de E-o, kaj fine ĉiu homo sentos neeviteblecon lerni ĝin por ke li povu facile internacie interkompreniĝi. Prof. Waringhien, tiama prezidanto de Akademio de Eo en la jaro 1971 diris pri registraroj: La lingvon internacian ili oficialigos ĝuste kiam ĝi ne plu bezonos ilian agnoskon, ĉar ĝi jam estos uzata de ĉiuj homoj kaj sur ĉiu kampo. - ing Tuma daŭrigas: ni ne devas iam forgesi, ke Eo estas artefarita lingvo aposteriora. Ni devas eluzi enorman vortprovizon kaj terminaron de ĉiuj vivantaj kaj mortaj naciaj kaj artefaritaj lingvoj. Por ĉi tiu laboro ni devas eluzi la plej modernajn komputilajn eblecojn.

Dŭkaz uĝiteĉnosti spoĉivá v kvalitě odborných slovníkŭ a jejich vědeckém uznání. Další potřebná období budou se vyvíjet automaticky: uĝiteĉnost - potřebnost – nevyhnutelnost. Jestliĝe dokáŝeme uĝiteĉnost, svět sám uzná potřebnost uĝití E-a, a koneĉně kaŝdý ĉlověk bude cítit nevyhnutelnost se mu uĉit, aby se mohl snadno mezinárodně dorozumívat. Prof. Waringhien, tehdejší prezident Akademie Ea v r.1971 řekl o vládách: Mezinárodní jazyk ony uznají právě tehdy, aŝ uŝ Esperanto nebude potřebovat jejich uznání, protože uŝ bude uŝíváno všemi lidmi všech oborŭ. - Ing Tuma pokračuje: Nesmíme nikdy zapomínat, ŝe Eo je umělý jazyk následný. Musíme vyuŝit ohromné zásoby slovní a termináŝŭ všech jazykŭ živých i mrtvých, národních i umělých. Pro tuto práci musíme vyuŝit nejmodernějších poĉítaĉový možností.

## KIEL ENKONDUKI ESPERANTON EN LERNEJOJN?

### JAK ZAVÉST ESPERANTO DO ŠKOL?

Ĝi estas temo ofte diskutata. Kial ni lernu Eon, se la ŝtato ne volas realigi devigan instruadon en lernejoj? Post la novembra velura revolucio kaj post tuja publika deklaro por ĝia subteno la unua faro de nia ĈEA-komitato estis ripetata peto al ministerio de lernejaferoj permesi la instruadon. La rezulto de traktado kun tiama ministro Adam aspektas iom magre: ni povas instrui Eon kie ĝi estas postulata kiel objekton de interes-rondetoj dum postlerneja okupo. Ni devas paciĝi kun la fakto kaj cerbumi kiel eluzi ĝin. Ni havas ne tiom da instruistoj, ke ni povu instrui Eon kiel devigan objekton. Multaj eĉ opinias, ke estus katastrofo, se la ministro permesus la instruadon kaj ni devus poste proklami, ke ni ne kapablas plenumi.

Je to ĉasto diskutovaný náměť! Naĉ se máme uĉit Eu, jestliĝe stát nechce realizovat povinnou výuku na školách. Po listopadové sametové revoluci a okamŝitém prohlášení našeho ĈES-výboru za její podporu, prvním ĉinem byla opakovaná ŝádost ministerstvu ŝkolství povolit vyuĉování. Výsledek jednání s tehdejším ministrem Adamem vypadá trochu hubeně: můŝeme vyuĉovat esperantu kde je ŝádáno jako předmětu zájmových krouŝkŭ mimoškolního vyuĉování. Musíme se smířit se skuteĉností a přemýšlet jak ji vyuŝit. Nemáme tolik uĉitelŭ, abychom mohli vyuĉovat Eu jako povinnému předmětu. Mnozí se dokonce domnívají, ŝe by bylo katastrofou, kdyby byl býval ministr povolil vyuĉování a my museli prohlásit, ŝe to nemůŝeme splnit.

Tamen ni havas ĉiujare novajn instruistojn ekzamenitaj per la pedagogia komisiono, kiuj sentas iom seniluziĝon, ke ili ne povas uzi sian kapablon en instruado lerneja. Jen la propono, kiun mi pridiskutis kun s-ino Barandovská. **ALVOKO POR la INSTRUISTOJ DE ESPERANTO.** Skribu al pedagogia sekcio de ĈEA Prago – Dr Barandovská proponon kun adreso de la lernejo, kie vi intencas instrui. Ne traktu mem kun la lernejo. ĈEA sendos al la direktoro de la lernejo leteron, kie estos citita la ministereia rekomendo por instruado en interesrondetoj. En la letero ĈEA rekomendos instruiston per indiko de lia nomo kaj adreso kun mencio pri lia instru-kapablo. Tial ĝi faciligos vian sekvan traktadon kun la lernejo kaj ebligas al vi la instruadon. Pripensu kaj anoncu al la pedagogia sekcio vian decidon. (Dr. H)

A přece máme každoročně nové učitele vyzkoušené pedagogickou sekcí, kteří cítí trochu zklamání, že nemohou užít své schopnosti vyučovat ve škole. Předkládám návrh, který jsem prodiskutoval se s-anino Dr Barandovskou. **VÝZVA UČITELŮM ESPERANTA.** Napište na adresu pedagogické sekce ČES Praha – Dr Barandovské návrh a adresu školy, kde máte v úmyslu vyučovat. Nejednejte sami se školou. ČES pošle ředitelovi školy dopis, kde bude citováno doporučení ministerstva školství výuky v zájmových kroužcích. V dopise ČES doporučí učitele s udáním jeho jména a adres a osvědčí jeho schopnost vyučovat. Tak usnadní Vaše následující jednání se školou a umožní Vaše vyučování. Promyslete si to a sdělte pedagogické sekci své rozhodnutí. (Dr. H)

#### UTAHOVAT SI ŘEMEN

Respondas s-ano Jaroslav Mařík el Prago, honora membro de ĈEA. Jak přeložit metaforické „Utahovat si řemen“? V časopise La Progreso z dvacátých let jsem našel „(Ni devas) buki la rimennon pli malvaste.“ Podle mne tam chybí „nian“ (rimennon). Rimeno je řemen. V PIV u „strikti“: „striкта vesto“ – těsný oděv. Dále pro opasek mám PIV – „Zono“ (strio ĉirkaŭ la talio – pás). Myslím, že lepší řešení než „buki la rimennon pli malvaste“ je „striktigi“ a protože „zono“ má i druhý význam „pásno“, je snadné zde použít „tali-zono“. Takže, konečně: utáhnout (utahovat) si opasek se zdá nejvhodnější: „striktigi sian talizon“. Sedí Vám to. Dalo by se adaptovat na „buki sian talizonon pli malvaste.“

Demandu pri pluaj aktualaj terminoj.

#### POLSKÁ ESPERANTISTKA DOROTA

serĉas kontaktojn kun junaj kristanoj aŭ katolikoj – esperantistoj kaj invitas ilin por pilgrimado Varsovio – Czenstochowa ek de 4.8. 91. La pilgrimo estas 10taga; ĉiutage oni paŝos ĉirkaŭ 30 kilometrojn. Oni dormas en propraj tendoj aŭ ĉe vilaĝanoj. Propra manĝaĵo. Prezo ne estas granda: 50 mil.zl. Ĉijare estos granda renkontiĝo en Czenstochowa de junularo kun la Sankta patro kaj aliaj reprezentantoj de la eklezio. La interesuloj skribu al adreso:

hledá kontakty s mladými křesťany nebo katolíky – esperantisty, a zve je na putování Varšava -Čenstochová od 4.srpna 91. Pout' je 10denní; každodenně se urazí 30 km přibližně. Spí se ve vlastních stanech a u vesničanů. Jídlo vlastní. Cena není velká 50 mil.zlotých. Letos bude v Čenstochové velké setkání mládeže se Svatým otcem a dalšími představiteli církve. Zájemci pište na adresu:

Dorota Malkowska, ul. Regulaska 7 A, PL 02-495 Warszawa-Ochota. La adreson sendis s-anino Mejstříková el Příbram, kiu interkonatiĝis kun Dorota dum pilgrimado TAIZÉ en Příbram.

### OKAZO RENKONTI ESPERANTISTOJN EL LA TUTA MONDO

estos dum monda kongreso de esperantistoj-fervojistoj en Olomouc en la tagoj 11.-18.V.91. Pli malmlultekosta estas la antaŭkongreso en Žilina kaj postkongreso en Prago. Informoj ĉe fervojista sekcio de ĈEA.

#### ESPERANTO-ADRESARO

enhavas adresojn de ĉiuj landaj organizoj, aparte junularaj kaj fakaj, gazetoj, radiostacioj kaj indekson de mallongiloj. Ĝi estas kompilita surbaze de Jarlibro de UEA, E-gazetaro kaj aliaj fontoj. Ĝi kostas nur 9 kronojn kaj mendeblas ĉe Karel Ryšánek jr., Šumavská 17, 12000 Praha 2. Ĝi ne enhavas individuajn adresojn.

#### ESPERANTSKÝ ADRESÁŘ

obsahuje adresy všech zemských organizací, zvláště mládežnických a odborných, časopisů, rozhlasových stanic a index zkratek. Je sestaven na základě UEA-ročenky a z jiných pramenů. Stojí jen 9 korun a lze ho objednat u Karla Ryšánka jr, Šumavská 17, 12000 Praha 2. Neobsahuje individuální adresy.

#### INTERNACIA KUIRLIBRO

enhavas 500 receptojn el 100 landoj, nuntempe aĉetebla ĉe ĈEA por nuraj 60 kronoj. Ne hezitu kaj tuj mendu senprokraste ĝin. En stokejo restas nur kelkaj lastaj ekzempleroj. Nia asocio tamen povas sendi al vi liston da haveblaj interesaj libroj kaj esperantaĵoj. Mendu post elekto por helpi al asocio kaso, kiu estas en kriza stato!

#### MEZINÁRODNÍ KUCHARKA

*EN KOLÍN*, la 10-an de novembro 1990 mortis subite 56 jaraĝa s-ano Václav T ŭ m a , fervojisto, faka metiisto, iama klubestro Helpe de E-o li multe vojaĝis eksterlanden kaj ekrilatis ku multaj s-anoj. Kun kelkaj li reciproke vizitis kaj invitis ilin al partopreno de la kluba kunveno, inter aliaj ankaŭ la plej malproksimajn geedzojn June Doig el Nova Zelando. Ni ne forgesu karmemoran samideanon!

*EK JABLONEC* nN 46621-PS 190 – preparas tradician printempan ekskurson kaj renkontiĝon sur monteto Kopanina en kabano Myslivecká chata sabate la 27an de aprilo kun vizito de ruinaĵo Frýdštejn. Eblas ankaŭ vendrede la 26-an de aprilo viziti ekspozician salonon en la muzeo de vitro kaj tranokti en turisma tranoktejo. Skribu al la klubo!

*EK ČESKÁ LÍPA + NOVÝ BOR* organizas tradician ekskurson ek de la 9-a horo sabate la 15-an de junio 1991. Renkontiĝo en la stacidomo, kuna forveturo en direkto al Litoměřice, piedekskurso 5 km al proksima pitoreska natura regiono Peklo. Reveno piede al Česká Lípa inter 13-14 horo. Atentu la novan horaron, validan ekde majo. Aliĝu ĉe la klubo Nový Bor, s-ano Karel Kratochvíl, 47301 N. Bor, Lidická 325.

*ATENTIGO – JABLONEC* nN la loka klubo atentigas, ke pro rekonstrulaboroj en la poŝtoŝtacio ne funkcias poŝtkesto 190. Skribu al Míla Jíra, Mechová 8-32, Jbc nN 46604. - La lingva seminario en Tanvald anstataŭ en februaro okazos pli malfrue.

**III-A VERDA ŜAK-OLIMPIKO** 5.-14.7.1991 en Poděbrady. Riĉa programo. Loĝado en la studenthejmo. Koncertoj. Tuttaga ekskurso al Prago+ekskurso per motorŝipo. Libera manĝado en bufedoj. Kunsido de EŜLI. Informoj: Ladislav Fiala, Fügnerova 28, 29001 Poděbrady. - Kuracaj akvofontoj!

**GERMANA-ESPERANTO-KONGRESO** okazos en Munkeno (München) 17.-20.V.91. Informoj: Esperanto-klubo, pf 200803, D-München 2 W.

**FRANCAJ KATOLIKOJ.** La jara kongreso de Franca Katolika Esperanto-Asocio okazos en Amiens de 26-a de aprilo ĝis 1-a de majo 1991. Inf.: S-ino J.Vincent, 26 bis rue Milngavie, F-49150 Baugé Francio.

**BRITAJ LABORISTOJ.** De la 12-a ĝis 14-a de aprilo 1991 havos lokon en Wedwood Memorial College en Barlaston la Konferenco de SATEB. In.: SATEB, 29 Farrance Rd., Romford, Essex, RMG 6EB, Britio.

**SAMECHOV** – renkontiĝo 21.-23.VI.91 – ne forgesu – vidu VF 1/91 – paroliga seminario kun eduka programo – malmultekosta: du tranoktoj 70 Kčs – manĝo 140 Kčs. Inf.: V.Stibůrek, 25601 Benešov, J.Franka 1751.

**NOVA INTERESA BULTENO** estas eldonata en 90501 Senica n. Myjavou. Petu provnumeron de Peter Bartal, E-klub, Dom kultury, Senica n. M.

**SAT**=Sennacieca Asocio Tutmonda estas longjara laborista mondorganizo, kiu eldonas monate belan E-gazeton Sennaciulo kaj krome unufoje jare „Sennaciecan revuon“. Ĉiu membro ricevada ilin kun SAT-adresaro kaj statuto de SAT. Kontraŭ 140 Kčs vi povas aliĝi ĉe Miro Závodský, 01004 Žilina 4, Zavodie, Ĉs brigády 67, kiu ankaŭ povas por vi peri (zprostředkovat) belan kazeton kvaronjaran – por turisman revuon ekologian „La migranto“ por 45 Kčs. Ne pre abonu!

**INTERHELPO** – kooperativa vojaĝoficejo, 15000 Praha 5, ps 44 proponas kelkfoje jare semajnajn ekskursojn al ĉebaltaj respublikoj en moderaj prezoj. Petu detalajn informojn.

**TURISMA SEKCIO** de Ĉeĥa esperanto asocio, Praha 1, Jílská 10 informos vin pri eblaj aktivecoj 1991 (Monda Turismo: karuselvojaĝoj – Internacia renkontiĝo naturamika Abaliget (H) – slovakaj renkontiĝoj turismaj – Universala kongreso en Bergen (N) 15000 Kčs – kaj aliaj.

**ŽELEZNÝ BROD** EK kunvenas ĉiusemajne de la 18a horo en klubo de pensiuloj, escepte de ĉiu dua mardo en la monato, kiam la klubanoj kunvenas en la salono de Urbodomo por la kultura prezentado.

**NOVAJ NOMOJ** estas en la nova dugrada strukturo de nia organizo gvidata de sep-membra konsilantaro kun 3 membra kontrolgrupo. Bazaj estas tradicie nomitaj Kluboj de esperantistoj kun aŭ sen subjektiveco. Ĉu la kluboj havas sencon?

**RADIO Polonia** disaŭdigis opinion de Bernard Golden (9.1.91): Jes, se ili plenumas bazan taskon: instruadon, informadon kaj praktikan aplikadon de nia lingvo. Ĉu via klubo plenumas tiun taskon?

**NOVÉ NÁZVY** jsou v nové dvoustupňové struktuře naší organizace vedené sedmičlennou radou a tříčlennou kontrolní skupinou. Základní jsou tradičně nazvané Kluby esperantistů s nebo bez právní subjektivity. Mají kluby smysl?

**RADIO Polonia** vysílala názor Bernarda Goldeny (9.1.91): Ano, jestliže splňují základní podmínku: vyučování, informování a praktické užití našeho jazyka. Plní Váš klub takový cíl?

Kion ni aŭdis en Třebíč? (fino de la kongresaj notoj). Daŭrigo de la diskuto: Pavel Polnické responde al Drahoš Kočvara: lotbiletoj estos eldonitaj okaze de la fervojista monda kongreso en Olomouc 1991. Oni atentigas pri malmultekostigo (zlevnění) de propagandajoj en la asocio. Establiĝas novaj privataj librovendejoj: postulu angulon de la esperantista literaturo. - D-rino Dvořáková-Jodasová Pavla: La junularo denove aranĝos semajnajn restadojn en Prago. - Ryšánek Karel: Atentigas pri grava problemo – ekonomio de nia asocio. Medalojn ni ne povas eldoni, ĉar ni ne havas monon. Solan solvon li vidas en esp. turismo, kiu havas realajn kondiĉojn por ekflori. Jaroslav Mařík, meritplena membro el Prago: Honte estas, ke ni – preskaŭ trimilmembra asocio ne kapablas disvendi „Historion de E-movado en CS“ de prof.Kamarýt, vere historiografie skribita. Ulrich Lina, komitatano de UEA, historiisto kaj aŭtoro de la „Danĝera lingvo“ skribis, ke li ankoraŭ ne vidis tion laŭvere science skribitan historion de nacia esperanto movado. La prezo estas 42 Kčs kaj ĝi kuŝas en stoko de nia asocio jam kelkaj jarojn. Ĉiu partopreninto de la kongreso en Třebíč ricevis unu ekzempleron por propagandi ĝin. - Mirek Malovec informis pri situacio de la vortaro. La aŭtora kolektivo preparis 38 aŭtorajn foliojn, kvankam la ŝtata pedagogia eldonejo postulis nur 35. Nun oni devas forstreki kelkajn leksikojn. Ĉar furoras intereso pri anglaj kaj germanaj vortaroj, oni proponas al ni eventuale serĉi privatan eldoniston. Eĉ tiu ideo ne estas vana, neakceptebla. - Inĝ Chrdle havis finan vorton, taksanta la sukceson de la kongreso. Decida estos la subteno de la membraro al la asocio, por kiu instigis ankaŭ la fina rezolucio.

La redaktoro pardonpetas de niaj legantoj, ke ni ne povis la referaĵon aperigi duonligve pro manko da spaco, kvankam ni konscias kiel grava estas la informiteco de niaj komencantoj. Espereble, freŝaj informoj nun aperos en la asocia preso kaj ni povos envicigi pli da instruaj artikoloj kaj ankaŭ trarigardon pri la eksterlanda esperantaj gazetoj.

POŝTPAGILON ni enmetas en ĉiujaran duan numeron de nia bulteno kun peto pri subteno de ĝis eldonado per libervola donaco. Ni bone scias, ke ne nur nia financa stato sed ankaŭ via monujo travivas krizon. Tamen pripensu, ĉu estas sencoplena, kiel diras nia prezidanto, vivteni niajn idealojn por pli bona tempoperiodo. Tiuj, kiuj jam sendis monon, pardonu, ke ni enmetas la poŝtpagilon por ĉiuj legantoj pro teknikaj kaŭzoj. Por via helpo ni kore antaŭdankas kaj klopodos fari nian bultenon.

Redaktor prosí o prominutí našich čtenářů, že jsme nemohli referát uveřejnit dvojjazyčně pro nedostatek prostoru, ačkoli si uvědomujeme jak důležitá je informovanost našich začátečníků. Snad se nyní budou čerstvé informace objevovat ve svazovém tisku a budeme moci více instruktivních článků a také přehledy ze zahraničních esperantských časopisů (publikovat).

POŠTOVNÍ SLOŽENKU vkládáme každoročně do druhého čísla našeho časopisu s prosbou o podporu jeho vydávání dobrovolným darem. Víme dobře, že nejen naše finanční situace, ale i Vaše peněženka prožívá krizi. Avšak uvažte, zda je smysluplné, jak říká náš prezident, uchovat ideály pro lepší časy. Ti, kteří již poslali peníze necht' prominou, že vkládáme složenku všem čtenářům z technických příčin. Za Vaši pomoc předem srdečně děkujeme a budeme se snažit učinit náš časopis zajímavým.

**SKOLTO 91.** Skola Esperanto Ligo aranĝos (2.-11.VII.91) en polaj Beskidoj internacian tendaron kun diversgranda instruado de E-o. Inf. Georgo Handzlik, ul. Braterska 41, PL 43-346 Bielsko-Biala. Pri agado de skoltoj-esperantistoj en CS informas SEL Klub esperantistů, Třebíč.

**SKAUT 91.** Skautský esperantský svaz uspořádá (2.-11.7.91) v polských Beskydách mezinárodní tábor s výukou E-a na různých stupních. Inf. Georgo Handzlik, ul. Braterska 41, PL 43-346 Bielsko-Biala. O činnosti esperantských skautů v CS informuje SEL-Klub esperantistů 67401 Třebíč.

**KIEL DIRI? LENTAIGNE:** Praktika esperanta frazeologio – daŭrigo (pokračování):

**JUSTICO:** Fariĝi ies (něčí) advokato. Li pledas (hájí), defendas sian klienton. Artifiko (úskok) de advokato. Konvinka (přesvědčivý) pledo. Peti ekspertizon (posudek) de medicinistoj pri mensa (duševní) stato de akuzito (obžalovaný). Fari ĉe juĝejo sensacian ateston (svědectví). La akuzito persistas en sia neado (zapírá). Ŝtata akuzisto per pruvobjekto (corpus delikti) intencas pruvi kulpon de akuzito. Raporti pri ĉiuj cirkonstancoj. Peti indulgon (shovívavost) de la juĝistoj. Akuzito, kion havas ankoraŭ por diri? Recidivulo. Rekrimanto. Publika malamiko. Hardita (otužilý, otrlý). Asiza (přisedící) ĵuriano (člen soudu, poroty). Decidi laŭ sia konscienco (svědomí). Ne apartenas al homo kondamni (odsoudit) alian homon al morto. Meriti la morton. Ekezemplodona (příkladný) puno (trest). Senindulga kondamno (nemilosrdný rozsudek). Kondamni iun je morto per ŝnuro, pendigo (oběšením). Solene diri (vyhlásit) kondamnon (verdikto). Absolvita (zproštěn viny) kun benefico de dubo (vyjádřením pochyb) – se la pruvoj ne estos sufiĉe fortaj. Reparacio (náhrada). Kondamnita al dumviva malliberiĝo (zbavení svobody). Prizoni (vězeňský) puno, reĝimo, sistemo, organizacio. Meti en karceron (uvěznit). Velki (zvadnout) en prizono. Kradita (zamřížovaný) vizitĉambro. Forkuri, eskapi (uniknout), fuĝi el la malliberejo. Provoso (vězeňský strážce, žalářník). Relegacio (vyhnanství). Ekzekuti (popravovat): pendumi, strangoli (uškrtit, krucumi (ukřížovat), ŝtiparumi (upálit na hranici), palisumi, radumi (lámat na kole), kvaronumi, elektroekzekuti. Oni pendigis la kanajlon (darebák) la kapon malsupren. Ekzekutisto. Doni la finfaran baton al iu. Voĉdoni (hlasovat) la abolicion (zrušení) de la mortpuno. Pendingo (šibenice). Gilotino. Eŝafodo (lešení popravčí). Rado. Ŝtiparo. Pilorio (kolono de malhonoro). Juĝo pro kontumaco (v nepřítomnosti). Juĝi en foresto. Ekstradicio (transdoni fuĝintan krimulon al alilanda justico). Preskripto (promlčení). Tajloro krimis, botisto pendas (senkulpulo pagas por kulpulo). Kiu ne krimas, tiu ne timas.

**KORESPONDI DEZIRAS:** (Mallongiloj (zkratky): bk=bildkartoj; ĉt=ĉiuj temj; d=deziras; iŝ=interŝanĝas; its=interesiĝas; jj=jaroj; kol=kolektas; kor=korespondi; m=muziko; pm=poŝtmarkoj; tm=tutmonde).

Azhar Mehmood, House near ali public school, Mohalla Eid Gah, TAXILA 47080 Pakistano – 22j, s-ano, kol pm, poŝtkartojn, monerojn.

S-ino Jacqueline Schmitter, Ceité Adelaide, F-67660 Betschdorf, komencantino, muzikprofesorino kun filo, d kor.

E-klubo, ONDO, B.O.193, SU 233000 Kaunas, Litovio, anoj d kor

Vicky Sinclair, 7 Eserton Gardens, Hendon, London NH4 4BB, Britio, 27j brazilano, vivanta en Londono its vojaĝado, ekologio, literaturo, biblioteko.

Lernejanjoj hispanaj E-30139 Los Ramos, esperanto-klubo.

Klosko Ilse, B1.342/ 1/39 4090 Halle-Neustadt, universitata instruistino pri muziko, pentroarto, literaturo, lingvoj, 44j. -GFR

Erdösy Mercedes, 16j, lernantino, H-118 Budapest, Regös u.7 III/10 pri sporto, danco, turismo, kol bk, kraĵonojn, insignojn.

KLEMEN Zsofi, 16j lernantino, H-1128, Budapest-Szenndró u.57 pri muziko, danco, kol bk.

SPANIK Beata, 16j lernantino, H-1126 Budapest, Szoboszial u.13 pri muziko, filmoj, modo, sporto.

SZEP Attila, 16j, lernanto, H-77100 Szekszárd, Béri Bálogh, Á.u.23, ĉt, pm, bk, alumetetiketojn.

Putyinka Aniko, H-1124 Budapest, Bürök u.4 pri naturo, bestoj, lingvoj.

ERMANN Mello, 48j naturisto, fraŭlo, I-20135 Milano, v-1e Monte Nero 22, aŭ I-25040 Bienno (Brescia), via Santa Maria 7, serĉas kontakton kun fraŭlino aŭ sinjorino por kunvivado. Infanoj ne estas obstaklo.

SZCZYGIEL Slawomir, 27j, elektroteknikisto, PL-27-400 Ostrowiec, Baltowska 232A, pri turismo, geografio, sporto, historio, literaturo, naturo, bk.

CRISTEA Mariana, 24j laboristino, R-2400 Sibiu, Str.Gorslaŭ BL T 16 Ap 22, pri ĉiuj temoj.

CIGMAIANU Mihal, 29j inĝeniero, R 2400 Sibiu, Str.Alexandru Vlahuta Nr 6 d kor pri ĉiuj temoj

ALBU Nicolae, R 2400 Sibiu, Str.Eroilor 9, 31j inĝeniero pri ĉt.

TROMBITAS Maria, R 2400 Sibiu, Bulevardul Mihal Viteazul bl.25, 65j kuracistino d kor pri ĉiuj temoj.

CAZACU Lucian, 52j medicina asistanto, R 2400 Sibiu, str.Izinei B1 15, Ap 31, dez kor pri ĉt.

MUNTEANU Marius, 38j inĝeniero, R2400 Sibiu, Alea Fratil Buzesti Nr 3 Ap 17, pri ĉt.

HORCHLER Marc, 17j lernanto, FRD5 Box, Ellsworth, ME 04805 USA pri komputado.

Urbodomoj de la mondo = temo de bildkartekekspozicio de Esperanto-klubo 3400 Cluj-Napoca 1 cP 1111, Romanio. Reciproke vi ricevos bk de u-domo.

Makubukva Ndonzoso, B.P.275 Mbanza Ngungu, BAS-Zaire, Zirio prezidanto de la nova klubo petas por kontakti kaj sendi E-materialojn.

MUNIBI Petro, 40j biologo, P.O.Box 742, Woden act 2606 Aŭstralio dez kor kun esperantistinoj pri literaturo, foto, medio, edukado.

xmxxmx

xmxxmx

xmx

x

Esperantský klub  
29501 Mnichovo Hradiště, CS